TEJO-aktuale: numero 472, 2022-04

**n°472 | Aprilo 2022**

---

Ĉu vi ŝatus pli vigle kunlabori kun aliaj junularaj movadoj en via kontinento? Ĉu vi celas konatiĝi kun homoj kiuj laboras en TEJO kaj pliproksimigi TEJO-n al la agado en via kontinento? Partoprenu en la Kontinentaj Junularaj Konferencoj!

---

Laborgrupo kreiĝis ene de TEJO por ĝisdatigi la Lingvopolitikajn Poziciojn (LPP) de nia organizo, kun pli ĝisfunda enhavo kaj homrajt-bazita argumentaro.

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn al la Estraro de TEJO por la mandato 2022-2023. La estraro estas la ĉefa plenuma instanco de TEJO.

TEJO kaj kvin partneraj organizoj ricevas subvencion por realigi unikan projekton: muzikalo en Esperanto, per Esperanto kaj pri Esperanto.

---

# Venontaj eventoj

La Germana Esperanto-Junularo invitas vin al la 29-a KEKSO, aŭ Kreema Esperanto Kurso! KEKSO okazos de la 3-a ĝis 6-a de junio 2022 en Oldenburg (Oldb)

**Por pli da informoj, alklaku la bildon!**

---

FIERU! 2022 – La GLATa Esperanto-Renkontiĝo okazos jam la trian fojon de la 20-a ĝis la 24-a de julio 2022 en la nove renovigita Esperanto-Stacio en Halbe ĉe Berlino.

**Por pli da informoj, alklaku la bildon!**

La 78a IJK de TEJO okazos en De Roerdomp (Westelbeers), Nederlando, inter la 20-a kaj la 27-a de aŭgusto 2022.

**Por pli da informoj, alklaku la bildon!**

---

**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**

## MEMBRIĜU EN TEJO!

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la Revuon Kontakto kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**
Sendu viajn novaĵojn al **tejoaktuale@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato
Antaŭdankon pro la helpo!

---

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Léonardo Popov
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Clément Baleyte

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) • tejo.org

*Kopirajto © 2022 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno

---

This email was sent to capiscuas@gmail.com
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands